# Esperanto por mi - 16 esperantistoj portretitaj de Helga Plötner




Mi, redaktanto HORI Jasuo, unuan fojon renkontis Helga-n dum la 100-a UK en Lille, Francio, en 2015. Post tio, ni komencis korespondi. Ŝi estas krajona portretisto, kaj ŝi ofte sendis al mi portretojn de esperantistoj. Dume mi pripensis fari el ili libron, kaj en julio 2020, ni publikigis ŝian unuan libron, "Esperanto por mi – 16 esperantistoj portretitaj de Helga Plötner". Mi pensis, ke tio estas la fino, sed Helga plu volis desegni, do ankaŭ mi decidis sekvi ŝin kaj publikigis la duan libron fine de tiu jaro.

Tiam, ne nur Helga, sed ankaŭ mi, sentis, ke tiu eldono estos grava por la movado. Ni komencis publikigi po du jare. La oka volumo estis publikigita en aprilo de ĉi tiu jaro, kaj ni nuntempe laboras pri la naŭa.

Ĉiu volumo enhavas portretojn de 16 homoj, duone viroj kaj duone virinoj, kaj eseon, kiun ĉiu verkis, temante pri "Mi kaj Esperanto". En ok volumoj, entute aperis 128 esperantistoj el la tuta mondo kiel "Biografio de esperantistoj en la 2020-aj jaroj". La eldonado estis tiel altetaksita, ke Helga estis premiita de UEA pro ŝia "elstara agado" antaŭ du jaroj.

Ĉi tiu 8a volumo prezentas homojn el Kroatio, Koreio, Japanio, Bulgario, Germanio, Brazilo, Meksiko, Tanzanio, Porto-Riko, Albanio kaj Pollando. Sube estas la parto de la antaŭparolo verkita de Helga por ĉi tiu volumo.

Mi, nun 80-jara handikapulino kun kronikaj doloroj kaj problemegoj, sukcesis portreti kun kuraĝa, forta VOLO ankaŭ por tiu ĉi 8a libro en BONFIDO, KREDO, AMO, ESPERO kaj ĜOJO. ESPERANTO VENKU IAM TUTMONDE por ke unu komprenu la alian en bona etoso! Estu nepre PACO, PACO, PACO tutmonde! Helga

Volumoj 1 ĝis 3 estas elĉerpitaj, sed ankoraŭ haveblas ekzempleroj de la postaj volumoj. Ili estas malmultekostaj, po 5 eŭroj, do mi esperas, ke vi aĉetos ilin ĉiujn kune. A4-formato, 16 paĝoj, koloraj. Ankaŭ estas ŝia alia libro "Mia pentrista vivo – Por Esperanto kaj por Paco" (15 euroj).

Por mendi, kontaktu Libroservon de UEA : libroservo@co.uea.org